GISTO, Majo, 2010.
Str.Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
Redaktas ottovaske@ibest.com.br
Donace por ĉeestantaj VerdKafanoj
Krom foraj loĝantoj R$ 1,00.

.....

KUNFRATIĜA TAGMANĜO

La nuntempajn esperantistojn oni devas alnomi fekundaj semeroj, al kiuj ne gravas ĉu la semoj falas sur kreskiga grundo aŭ ĉu ili falas sur asfaltan areon, gravas semi esperoplena ke pluvakvo ilin deponos ie sur favora grundo. Io tia okazis la pasintan sabaton 08/05/10. Nur pokaj elstaraj idealistoj konsentis fariĝi gastoj dum la tagmanĝo al kiu devintus avide veni la verda gaŭĉaro. Por ĉi kunsido ni povis kalkuli eĉ pri la gaŭĉa londonano Lenio Marobin.

Ĉiam li malavare kunportas diverstitolajn revuojn por la ĝojo de diligentaj gesamideanoj, distribuataj dum niaj VerdaKafoj. Unuaj alvenintoj rajtas elekti inter du aŭ tri revuoj kiujn mi kunportas al la kunsido. Bedaŭrindaĵo restas la fakto ke mi aldone diras :la prezo de la transdonita legaĵo estas, sendi al lia adreso almenaŭ PKarton, por savi mian promeson rilate al li. Nu, se mi invitas gastojn por senpaga tagmanĝo kaj aperas nur la samideanoj plej fidelaj al nia idealo, ja ne estas surprizo se neniu sin degnas sendi kelkajn salutvortojn al la sindediĉa donacinto de revuoj kaj aliaj utilaĵoj, eĉ ne per e-poŝto. Ĉu ili ofendiĝos se oni nomas ilin pigruloj?! – Cetere nia kara Migel estis ne kontaktebla manke de valida surpapera adreso kaj mia e-mail al li dufoje senditaj revenis.

.....

Brutobredado sklavigas, torturas kaj mortigas bestojn. Ĉu vi estas el tiuj kiuj lukras aŭ ĉu vi subtenas tiun merkaton ??...

ABOMENINDAĴO

Oni anoncas montri, dum la monda futbalpokalo funebran ceremonion kutiman en Afriko. Far la organizaĵo FALA BICHO, per Internet montras sangoverŝan filmon... tristan, kruelan enuigan. Ĝi aperigas nigran bovon kuŝantan livaflanke sur speco de lito ĉirkaŭ duon metron alta de la sojlo, kun la gamboj firme ligitaj. Pluraj homoj cirkaŭstaras. Difinitan momenton viro prenas tranĉilegon kaj helpate de du ceremonianoj firme tenas la kapon de la bovo flankenturnitan por faciligi la kruelan sangoverŝon. La “buĉisto” ektranĉas la gorĝon dum la povra besto gruntas pro doloro, sin skuas kaj blekas pro doloro, sin skuas kaj provas liberiĝi el la ligaĵoj, brue elspiras , gruntas kaj blekas. La buĉisto provas tratranĉi ĝiajn ĉefajn arteriojn, la bovo larĝe apertas sian okulojn dum alia helpanto alpremas al la vundego bovlon kaj rikoltas la varman sangon. Videblas ke laŭ eblis la besto, per la ligitaj antaŭaj piedoj skrapis sulkon en la grundon antaŭ ol ĝi finelspiris.

Nun, kompatopeto: Minimume vortigu mesaĝon kontraŭ tia terura prezentaĵo kaj sendi ĝin al jenaj e-adresoj kun la celo, ne allasi tian sangofesto antaŭ publiko kunveninta por spekti lojalajn sportajn konkursojn, ne sangan spektaklon. Jen: marmolejosd@forein.gov.za – Al FIFA: newsletter@2010.com – al la organizaĵo diskoniganta la filmeton: Blog http: ogritodobicho.blogspot.com

NELACIGEBLA LABORISTO

Eltiraĵo de DESPERTAI!,Maio 2010.

Se jam sciate, indas veki la gardanĝelon de laboristo kiu senhalte laboras tage kaj nokte, tute senripozo, ne postulas libertempon nek salajron, 99% fidinda. Instruitaj homoj jam divenis, que la mirinda maŝineto nur povas esti la koro. En lernejo ni ĉiuj lernis sed forgesas kaj, danĝere, ni neglektas adekvate zorgi pri la bonfarto de nia vitala pumpilo. Neniun organon oni povas perdi sed se subite mankas la kora pulsado, post pokaj minutoj ne restas ebleco pluvivi. Post ĉi konsideroj permesu al mi rememorigi al niaj karaj legantoj ke adolta homo enhavas ĉ.kvin litrojn da sango sed ene de kvin sekundoj, dum sportado, la koro kapablas kvarobligi la sangofluon, tio estas, cirkuligi 20 litrojn da sango po minuto. La pulsado, kontrolata de la nerva sistemo, okazigas kontrahiĝon de la atrio nur ono de sekundo antaŭ ol okazas tiu de la ventriklo. Tiu pulsado, en etaj animaloj kiel de kanario okazas 1.000 fojojn ĉiuminute. La pulsado de grandegaj bestoj kiel elefanto okazas averaĝe 25 fojojn en unu minuto, tiu de la blua baleno nur po 20 en minuto. Koro de homo sana pulsas ĉ.100.000 fojojn en ĉiu tago. El tio rezultas ke en homo 70 aŭ 80 jaraĝa okazis ĉirkaŭ 3 **miliardoj** da korbatoj!

> Saĝa homo, de ĉi teksto tiras la scion, ke oni devas teni enmense la zorgon, kiel Gardanĝelo, pri la bonfarto de sia nelacigebla pumpilo, ekzemple, neniel haste ekkuri 100m aŭ pli, antaŭ ol iom varmigi la komplikan cirkuladan sistemon, ne enŝuti alkoholaĵojn, neniel stimuli sin per toksaĵoj. Ili atacas krom la cerbon ankaŭ aliajn vitalajn korpopartojn, malrekte ankaŭ eĉ gefamilianojn, ĉar toksaĵoj enhavas la diablon.

.....

Bovobredado sklavigas, torturas kaj mortigas animalonjn. – Ĉu vi kalkulas sin inter la homoj kiuj lukras aŭ, ĉu vi kalkulas sin inter tiuj kiuj subtenas tian merkaton?

FIA SINTENO

Supozeblas ke ĉiu homo, escepte pokaj personoj (frenezuloj), estas kapablaj distingi inter kio rekte utilas kaj kio malutilas al la tuta homaro. Rezulte de tiu koncepto la tuta homaro devus partopreni la tutmonde ekzistantajn filiojn de la Verda Partio. Laŭ ĵurnaloj, en Eŭropo ĝi lante prosperas sed nialande la PV nur limakpaŝe avancas.Ĝia prosperado kompareblas al tio de Esperanto. Tia sinteno pensigas ke neniu analizas kaj rekonas la valoron la celon de ambaŭ. Tristiga perspektivo!

Iom humura. BV rideti...

NUNTEMPA AMINDUMO

Ino rakontas al sia najbarino la skandalan enamiĝon de sia filino al knabego.

- Rakontu al mi...

- Mi spionis mian filinon kaj ŝian amanton, en la vizitĉambro sin kunpremi kaj frotiĝii laŭvole, mano ĉe la cicoj mano al lia peniso...li super ŝi, poste ŝi super li...ĉio normale, mi toleras.

- Sed mia kara, se ili seksumis kaj vi toleras, vi estas liberala. Ĉu mi rajtas scii la kialon de via skandaliĝo ?

- Eble vi ne kredas kara, post tio ambaŭ purigis sin per la kurteno...

BRUEGO

Gasto plendas en modesta hotela akceptejo internlanda...

- Ĉi hotelo estas la plej maloportune situita en la mondo...ĉiun kvaronhoron bruego vekis min... mi preskaŭ ne sukcesis dormi... fermu mian konton, mi tuj foriras, por neniam reveni!

Tuj poste envenis gastoparo kun la plendo, ke ulo en najbara ĉambro tiel terure forte ronkadis ke, je ĉiu 15 minutoj ni devis frapegi la vandon, por veki lin!